

Salutvortoj
de Probal Dasgupta - prezidanto de UEA
kaj Stefan MacGill - prezidanto de ILEI
al partoprenantoj de la 28-aj ARTaj KONfrontoj en ESperanto "Arkones"

Karaj Arkonestroj, au Arkonautoj,

Tre koran dankon pro la invit' al arkonesko, kaj mi ja ne malghuis mian partoprenon en la pola jaro 2009, sed mi bedaurinde ne trafos mem veni chi-foje. Permesu al mi tamen en burleska stilo saluti la kreantojn de arkana sagho kaj de pafarkista kuragho en unu el la pintaj kulturaj eventoj de nia kalendaro. Allasu, ke mi ech karakterizu tion chi kiel oficialan saluton de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio al la 28aj Artaj Konfrontoj en Esperanto okazontaj inter la 21a kaj la 23a de septembro 2012 en Poznano, Pollando. Mi devas konservi mian reputacion de manka respondeco!

Se temas pri formoj, karaj arkanuloj, chu neniu iam diris al vi, ke en la esoteraj Esperantoj per kiuj ni pilkas la finajho es markas la genitivon, kiel en Probales kaj Istvanes? Chu do neniu demandis vin, kiu do estas tiu mistera Arkon, de kiu via evento estas la genitiva formo? Jen ideo por iu venonta jaro, por skecho, surpodie prezentanta la vizaghon de Arkon. Neniu diru, ke mi forgesis mian amatan chevaletan, la Projekton Vizaghoj.

Tute formale salutas vin

Probal

Probal Dasgupta, prezidanto,
Universala Esperanto-Asocio,
en arkanaj rilatoj kun la mondaj institucioj (serioze demandu foje, se vi pensas, ke chi tio estas sherco)

Saluto al Artaj Konforntoj!

Lastatempe ILEI anoncis – ne tro serioze – la lanĉon de premio ‘Kongressako de la Jarmilo’ por ke ĝi en la unua jaro povu aljuĝi tion al si mem, pro la mirinda sako el sia ĵusa konferenco en Kunmingo. UEA nun serioze konkurencas, kaj devos pripensi lanĉon de propra premio: ‘Arkanega Eventosaluto de la Jarmilo’. La verko, kiun vi ricevis de la prezidanto de UEA, Probal Daŝgupto, preteriras ĉiajn normojn kaj defiojn – arkaneco eĉ ne komencas priskribi ĝin.

Jen do pli modesta saluto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) al la 28a Arkones. Kiom mankas al ĝi vortluda pireteknikaĵumado kaj hiper-erudiciaj aludoj, ĝi espereble regajnas per simpleco kaj tuja kompreneblo.

ARKONES prenis lokon inter la plej renomaj kaj valoraj artaj aranĝoj de nia Esperanta vivo; ni deziras al vi varian kaj kontentigan kolekton da artospertoj. ILEI iel markas arteman jaron. La konferenco en Kunmingo – jes, tiu kun la mirinda sako – okazis ĝuste en Arta Kolegio, kies tasko estas antaŭenigi kaj konservi precipe la kantajn kaj dancajn tradiciojn de la dudekkvino da nacimalplimulto, kiuj vivas en la provinco de Kunmingo, Junnano. Ĝi tamen faras tion en maniero, kiu estas samtempe tradicia, samtempe moderna – ke tiuj artformoj komuniku ion al nuntempaj junuloj. La temo de nia konferenco estis: ‘Arto de Komunikado, Komunikado de Artoj.’ Ĝuste tion vi faras en Poznano.

Mi salutas aparte la studentojn kaj gvidantojn de la ĵus finiĝinta kursaro en la Universitato UAM, fidante, ke per diligenteco kaj aktiva partopreno, ili jam meritas la ĝuon kaj malstreĉiĝon de via aranĝo. Fartu bone!

Stefan MacGill
Prezidanto de ILEI